{636.1 + 636.7/8} : 637.51 (079.5)

## GRAVA ALVOKO DE LA UNIVERSITATO DE LUND, SVEDUJO.

Ĉe la Universitato de L u n d, Svedujo (en Skanio, la suda parto de Svedujo) profesoro de la universitata etnologia arkivo esploros la buĉadon de ĉevaloj kaj la manĝadon de ĉevalviandon.

Ĉar nenie ekzistas sufiĉa literaturo pri tiu temo kaj ĉar la esplorado ampleksos la tutan mondon, la universitato deziras uzi Esperanton por tiamaniere atingi ĉiujn landojn kaj ĉiujn popolojn.

Pere de Sveda Esperanto-Federacio la universitato pro tio petas ĉiujn helpi ĉirilate kaj afable serĉi respondojn al la subaj demandoj. Ĝi esperas, ke vi ĉiuokaze sendos respondon, eĉ se vi ne sukcesos ricevi kompletajn detalojn. Ni kalkulas je tio, ke vi faros vian plejon.

La respondoj (en Esperanto) estu ĉe la universitato
por eŭropaj landoj plej malfrue la 1-an de julio 1952
por ekstereŭropaj landoj la 1-an de septembro 1952.
Adreso: Etnologia Arkivo de la Universitato, Finngatan 8, LUND. Svedujo.

**La demandoj:**

### PRI ĈEVALVIANDO KAJ PRI BUĈADO DE ĈEVALOJ.

1. Kia estis antaŭe la opinio pri ĉevalviando kiel nutraĵo kaj kia ĝi nun estas?
2. Ĉu la mortigado de ĉevalo, hundo kaj kato kaŭzis socialan malhonoron, kaj kiel tiukaze tio montriĝis?
3. Ĉu ekzistis speciala persono, kiu havis la taskon mortigi ĉevalojn, hundojn kaj katojn? Kiel li nomiĝis kaj kiel li estis akceptata?
4. Kiamaniere okazis la mortigado de tiaj bestoj?

06.049.2 : 30 : 408.92

## INTERNACIA KOMISIONO „ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO". (Starigita en 1950).

La celo de I.K.E.S. estas:

A. Progresigi la praktikadon de Esperanto inter personoj, organizoj, entreprenoj, institutoj, instancoj, kiuj respektive pro profesio, studo, tuta aŭ parta funkcio okupas sin pri sociologio, science, esplore aŭ aplike;
B. kontribui al la apliko de sociologio por pli bone konigi la Esperanto-movadon kaj por plivastigi ĝiajn eblojn;
C. kunlabori en la kadro de jam ekzistantaj Esperanto-organizoj, organoj, kongresoj kaj aliaj kunvenoj, utiligante la jam estantajn eblojn kaj la rimedojn disponeblajn por la celoj menciitaj;
D. helpi laŭpove al la disvolvo de internaciaj rilatoj en sociologia tereno;
E. kontribui laŭpove al internacia pliprofundigo de la kono pri interhomaj kaj intergrupaj rilatoj kaj pri ŝanĝoj de aŭ en sociaj institucioj kaj ideoj.



06 : 049.2.053.7„1951" (43-216) : 30 : 408.92

## KONCIZA RAPORTO PRI KUNVENO DE INTERNACIA KOMISIONO „ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO", OKAZINTA LA 10an DE AŬGUSTO 1951 EN LA UNIVERSITATO, MUNKENO.

De la komisiono ĉeestas s-roj G e t h i n g, K e u r, L a u r a t; malhelpitaj ĉeesti D-ro S o l z b a c h e r (komisiona prezidanto), f-ino S c h e e r l i n c k. S-ro G e t h i n g anstataŭe prezidas. S-ro B o r n e m a n n el Hannover esprimas gratulon kaj bondeziron okaze de tiu ĉi unua ĝenerala renkontiĝo de interesiĝantoj pri sociaj temoj.

Ĉeestas en la kunveno 20 personoj. La respondantoj al la alvoko de la komisiono estas nome menciataj kaj tiuj, kiuj jam deklaris sin pretaj kunlabori, estas instalataj. La kunveno sendas korajn salutojn al D-ro Solzbacher.

Sekvas ĉi-sube resumo de la konstatoj kaj rekomendoj de la kunveno.

Sociologio estas la scienco pri interhomaj kaj intergrupaj rilatoj kaj ilia signifo por la socio.

La pristudo kaj esploro de la homa socio, kune kun la konstatoj, eventuale direktivoj, kiuj povas rezulti el ili, povas esti valoraj por internacia komprenîĝo, bonfarto kaj ĝusta evoluo de la homaro.

Ankaŭ la aplikado de la scienco pri homaj kaj grupaj rilatoj necesigas atenton, ĉar tiu aplikado resonas en sociaj leĝoj kaj socia laboro.

Estas memkomprenebla afero ke estu praktikata universala pontlingvo por plifaciligi plej efike internacian kunlaboradon en la vasta sociologia tereno.

Por favori kaj disvastigi tiun praktikadon, komisiono stariĝis dum la Pariza kongreso en 1950. Per la nomo „Esperanto kaj Sociologio", esplora kaj aplika, tiu komisiono anoncas sin ekde sia estiĝo.

La Esperanto-movado mem estas socia fenomeno. Ĝia kreskado-procezo okazis ĝis nun sen sufiĉa scienca observo aŭ pristudo; ekzemple ni tro malmulte scias pri la socia konsisto de ĉi tiu movado. Necesas ke ĉi tiu manko estu forigata.

Plue:

Antaŭ kelkaj monatoj la komisiono alvokis la interesiĝantojn-esperantistojn en la socia tereno. Kvankam la alvoko ankoraŭ cirkulas kaj kelkaj personoj jam anoncis sin, la provizora konstato povas esti farata ke la nombro de la sociistoj-esperantistoj evidente ne estas kontentiga.

Estas dezirinde ke la Esperanto-movado ne neglektu la socian sektoron, tio signifas tie ĉi ke ĝi ne malatentu profesiulojn kaj studentojn en sociaj scienco kaj laboro: